


Ĵus naskiĝintaj pelikanaj beboj en Perto



Esperanto sub la Suda Kruco

Novembro-Decembro 2001
Numero 54 (vol. 9, no. 6)



ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Numero 54 (volumo 9, numero 6), Novembro-December 2001

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

☎: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝto: sudakruco@sudakruco.org

Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo,
143 Lawson St Redfern, NSW 2016,
Aŭstralio. E-poŝte:
libroservo@ans.com.au

Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towomba Road,
Oakey Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝte:
hazgreen@tmba.design.net.au

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: “Ni vere bezonas artikolon pri ...?” Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Ni preferas ke vi sendu vian kontribuon per e-poŝto, al la adreso sudakruco@sudakruco.org; vi povas ankaŭ sendi ĝin sur Zip-disko (100mg aŭ 250mb), sur komputila disko (Mac aŭ Windows), sur KD, aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitaĵajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

La kovrilbildo: Beboj de sovaĝaj pelikanoj, elkoviĝintaj la lan de septembro 2001 en la Bestoĝardeno de Perto, Okcidenta Aŭstralio. La gepatroj mem libervole elektis tiun akuŝejon. → p19.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

Nova Esperanto-poŝtmarko.....	3
Instrui esperanton en Vjetnamo (Franciska Toubale).....	4
Nekrologo: William Carl Olsen	5
La konkurso-rezultoj.....	6
Interrete	7
Nia nova konkurso	7
Skribas la legantoj	
Trevor Steele	8
Paul Desailly	9
2002 Somerlernejo ĉe Perto	11
Helopeto por funkciigi la Projekton “Per A - Por E”	11
Renkontiĝo en Auckland.....	12
Gramatika angulo: Kio estas komplemento (Marcel Leereveld)...	13
Ligo de Instruistoj (Jenny Bishop). 15	
Krioj sur deklivoj (Stefan kaj Hahnal MacGill).....	17
Odlo Bokserp: liaj paĝoj.....	18
Malformalaj esprimoj.....	20
Hajkoj	24
Indekso 2001	25

English Supplement

ESK estas legebla per la Interreto:
<http://www.esperanto.org.au/esk>

Limdato por artikoloj por la januara numero: 10 decembro.

Nova Esperanto-Poŝtmarko Kroatio 2001

Honore al la Universala Kongreso de Esperanto en Zagrebo, la Kroatia poŝto eldonis oficialan poŝtmarkon multkoloran, kiun ni reproduktas ĉisube.



Sub lupeo (250%) la detaloj vidiĝas:



Instrui Esperanton en Vjetnamo de Franciska Toubale

Por malgrandigi la laciĝon post flugo al Eŭropo, mi ĉiam haltas ie survoje. Ĉijare mi akceptis la proponon de Sino Cao Thi Qui instrui Esperanton en Urbo Ho Ĉi Minh dum dek tagoj, kaj pasigis tie dek du tagojn.



Ĉiun matenon akurate rikiŝo-veturigisto kondukis min al privata universitato pri lingvoj kaj informado, kie mi instruis komencantojn de la 8a ĝis la 1a horoj. Kiam la prezidanto de la Esperanto-Asocio en Ho Ĉi Minh, S-ro Le Nhiem,

akceptis min, li montris al mi la liston de la aliĝintoj: entute 162 studentoj!

Kiel li arigis tiom da kandidatoj? Tute simple, tio estis la rezulto de la talento de S-ro Tran Quan Ngoc, ĵurnalisto, verkisto, kaj pentristo, kiu prelegis pri Esperanto en la universitato dum kvar horoj. Mi certe admiras lian sukceson, sed kiel mi elturniĝos? Kvankam mi pli-malpli uzas similan metodon, mi ne estas Andreo Cseh!¹

Bonfortune por mi, nur kvindeko da ili prezentis sin je la unua mateno, kaj dudek kvin/tridek sekvis la tutan kurson, malaperante de tempo al tempo por trapasi la jarajn ekzamenojn de la universitato. Mi devas

substreki ke inter ili estis la vicdekano de la universitato kaj du profesorinoj pri lingvoj. Vizitis la kurson ankaŭ profesorino pri la Franca lingvo.

Kompreneble la kurso ankaŭ komenciĝis per inaŭguro. Strange, la etoso de tiu nepra formalajo ne estis solena, sed tute amika. Mi ricevis grandan belan bukedon da floroj.

Instrui Esperanton al tiuj gejunuloj alportis al mi grandan ĝojon; ili rapide enkapigis la lingvaĵojn, tuj rimarkis la novajn elementojn, volonte ludis kaj humure respondis la demandojn. Tri Esperantistoj ĉeestis la kursaron kaj helpis min kontroli la uzitajn lingvaĵojn dum gruplaboro kaj respondi al individuaj demandoj.



Kvankam ni povus interkompreni unu la alian pere de la Franca aŭ la Angla lingvo, S-ro Ngoc tradukis en la Vjetnaman, kiam ajn mi trafis delikatan punkton pri kiu la Esperantistoj ne interkonsentas, ĉar mi deziris montri al ili ke, laŭ la Fundamento, ĉiu Esperantisto respondecas pri la estonto de la lingvo, devas mem elekti tion kio ĝustas, kaj rifuzi nenecesajn neologismojn.

Eĉ antaŭ la fino de la kurso, la studentoj sin demandis kiel daŭrigi la studadon de Esperanto. Mi insistis ke

¹ Fondinto de metodo instrui Esperanton tute sen uzi la propran lingvon de la studentoj. — Red.

la diversaj ebloj estu listigitaj kaj disnunitaj dum la ferma ceremonio kune kun atestilo. La du profesorinoj varme dankis min, dirante ke ili ne nur lernis la lingvon sed ankaŭ multon pri metodologio. La vicdekano intencis malfermi klubon en sia universitato post la somera ferio, sed estis pli oportune tuj kontentigi la petantojn kaj proponi almenaŭ semajn kurson. Mi esperas ke tio estis farita dum la restado en Eŭropo.

Posttagmeze mi gvidis du aliajn kursojn (de la 2.30 ĝis la 4.30 por progresantoj, kaj de la 5.30 ĝis la 7.30 por komencantoj) en alia parto de la urbo, en la DOMO DE AMIKECO. Tiu estas la renkontejo de diversaj asocioj celantaj pacon inter Vjetnamio kaj fremdaj landoj.

Kvankam bone konante la gramatikon, kaj kapablaj sufiĉe bone skribi, la plejparto el la ok progresantoj ne kapablis paroli. Do mi provis paroligi ilin kiel eble plej.

La grupo de komencantoj enhavis ĉirkaŭ dudek kvin lernantojn, de dek-ĝis sepdek-jaraĝaj. Tamen multaj ne estis veraj komencantojn. Ili ŝatis la humoron de MAZI EN GONDOLANDO, kaj lernis en ĝoja etoso, helpante unu la alian. Sendube tie homoj de diversaj aĝoj kutimas kune vivi. Estis instrue por mi rigardi kiel ili bone inter si organizis la klason.

Kvankam mi estis tre laca je la fino de la kurso — mi ne kutimas tiom labori ĉiutage — mi konsideris min fortuna, ĉar mi havis oportunon sperti la Vjetnaman vivmanieron en gaja etoso. Mi esperas ke mi bone helpis semi, kaj ke poste venos abunda rikolto.

Ni informiĝis pri la morto de Dudley Parkinson en Tasmanio, la 12an de oktobro. Nekrologo aperos en posta ESK.

William Carl Olsen

4/5/1920-3/9/2001



Vilĉjo (Bill) Olsen

En Lower Hutt la 5an de septembro la familio Olsen adiaŭis Vilĉjon, kaj la Esperanto-Klubo de Masterton ĉeestis, kun kelkaj el liaj geamikoj.

Post la morto de sia edzino Eileen, Bill sukcese zorgis pri si mem, kun nur la blanka kato Sooty kiel domkunulo. La pasintan majon, pro malfortiĝanta sanstato, Vilĉjo translokiĝis al Wainuiomata, por loĝi kun sia filino Anne.

Malĝojigis nin ke nia amiko de 30 jaroj forpasis. Li estis fidela ano kaj iama prezidanto de la Klubo de Masterton. Lia entuziasma interesiĝo pri lingvoj kaj lia amo por Eileen logis Vilĉjon al Esperanto. Vilĉjo kaj Eileen partoprenis en multaj kongresoj, kaj ĝuis paroli Esperanton kun korespondamikoj kaj aliaj homoj kiujn ili renkontis dum la vojaĝoj.

Tiuj kiuj konis lin memoras Vilĉjon kiel bonhumoran viron, kiu estis volonte pardonata kiam li krokodilis, ĉar li tiel parolis por rakonti aŭ amuzan ŝercon aŭ taŭgan poemon. Por Vilĉjo la sola malkontentiĝo pri Esperanto estis ke ĝi ne interesas la gejunulojn de Nov-Zelando.

Aliaj hobiaĵoj de Vilĉjo estis la Skandinavia Klubo, lokomotivoj, kaj aliaj motoroj. Lia hejmlaborejo estis plenkona de aĵoj, kaj li ĝuis ripari aŭ estiĝi ion por siaj geamikoj. Ne necesis enciklopedio por niaj klubanoj, ni nur petis respondon de Vilĉjo.

Ni ne plu povas viziti Vilĉjon, sed feliĉe ni ankoraŭ havas neforgeseblajn memorojn.

Esperanto-Klubo de Masterton



POR RIDIGI VIN



Cindrulino atingis sian 75-jaraĝon. Post tute kontentiga vivo kun la (nun mortinta) Princo, ŝi kutimis sidi feliĉe sur lulseĝo, rigardante de sia portiko la preterpasantojn, kun sia fidela kunulo Alano, la maljuna kato.

Iun sunoplenan tagon, tute neatendite, aperis antaŭ ŝi la febopatrino. Cindrulino demandis: “Febopatrino, kion vi faras ĉi tie, post ĉiuj ĉi jaroj?”

La febopatrino respondis: “Nu, Cindrulino, pro tio ke vi plenumis bonegan vivon ekde nia lasta renkontiĝo, mi decidis plenumi por vi tri dezirojn. Ĉu ankoraŭ restas io por kio via koro sopiras?”

Cindrulino miregis, ĝojplena, kaj post pensema konsidero, kaj preskaŭ flustre, faris la unuan peton. “Mi deziras estis preterkomprene riĉa.”

Tuj la lulseĝo transformiĝis kaj fariĝis el solida oro. Cindrulino preskaŭ paralizigis. Alano, la maljuna fidela kato, saltis de ŝiaj genuoj kaj kuris al la rando de la portiko, korduŝe tremetante pro timo.

Cindrulino diris: “Ho dankon, febopatrino.”

La febopatrino respondis: “Estas bagatelo. Kion due deziras via koro?”

Cindrulino rigardis sian malfortan korpon kaj diris: “Mi deziras denove esti juna kaj plena je junulina beleco.” Tuj la deziro plenumiĝis kaj ŝia bela juna vizaĝo reaparis.

Cindrulino sentis ene tumultojn kiuj jam dum jaroj dormis, kaj longe forgesintaj vervo kaj vivoforto ekfluis tra ŝia vera animo.

Refoje parolis la febopatrino: “Jam restas unu deziro. Kion alian vi volas, Cindrulino?”

Cindrulino rigardis la timigitan katon en la angulo kaj petis: “Mi deziras ke vi transformu Alanon, mi-an oldan katon, en belegan junulon.”

Magie (kompreneble) Alano subite ŝanĝiĝis tiom fundamente en sia biologia konsistigo, ke, kiam kompleta, li staris antaŭ ŝi, junulo tiom bela ke nek ŝi nek la mondo iam ajn vidis tian similaĵon, tiom plaĉan, ke ja la birdoj komencis fali el la ĉielo por sterni sin ĉe liaj piedoj.

La febopatrino ankoraŭfoje parolis: “Gratulojn, Cindrulino. Ĝuu vian novan vivon.” Kaj, kun flamega ŝoko de brila blua kvazaŭelektro, ŝi puf! malaperis.

Dum kelkaj tremigaj momentoj Alano kaj Cindrulino fikserigardis en la okulojn unu de la alia. Cindrulino sidis, spiromanke, rigardante la plej paralizige perfektan junulon kiun iam ajn ŝi vidis. Tiam Alano paŝis al Cindrulino, kiu sidis kvazaŭ trapikita en sia lulseĝo, kaj tenis ŝin tenere en siaj junaj, fortaj, muskoloplenaj brakoj.


Li klinis sin apud ŝian oreilon, en kiun li amoreme, suspire flustris, iom forblovetante ŝian oran hararon per sia varmeta spiro: “Mi vetas kara, ke vi bedaŭras nun la elhakon de miaj kojonoj, ĉu ne?”

(Tradukita kaj ornamita de Vera Doloro, LMK de Lia Moŝto, Sinjorego Odlo Bokserp)

La Konkurso

en nia lasta numero estis ŝajne tro malfacila por la legantoj. Nin atingis nur du tradukaĵoj, de Terry Manley kaj Franciska Toubale. Iliaj tradukaĵoj estas ambaŭ bonege faritaj, kaj ambaŭ meritas la premion, pri kio ili jam estas kontaktitaj.

La du tradukoj estos la bazo por eldonita teksto de la faldfolio. □



Interrete



• **Nia sekretario petas:** I would like to ask everyone with an e-mail address to contact me at pitney@cybernetint.net to make sure I have their latest details.

• **Netscape 6.1** nun haveblas por Macintosh OS 9.x kaj OS X. Ĝi bone montras unikodajn literojn, kaj krome estas rimarkinde stabila. Ankaŭe, ĝi estas inter la unuaj retlegiloj por OS X kiuj ebligas sekurajn konektojn kun bankoj.

• **Amnestio Internacia en Esperanto:** Danke al Vincent Charlot, ekde nun eblas legi aktualajn komunikojn de Amnestio Internacia en Esperanto. La tekstoj estas libere uzeblaj, kaj vi povas aperigi ilin en viaj revuoj aŭ informiloj. La materialo troveblas ĉe: <http://users.skynet.be/bs939002/amnestio.html>. [Laŭ *Eventoj*]

• Ni ricevis la sekvantan peton per e-poŝto:

Thu Oct 04, 2001

Mi skribas vin el la Mongolio. Mia nomo Suren Bodshos. Mi parolas Anglalingvo. Mi volas tre bona lernanto esperanto lingvo. Mi bona legas kaj komprenas vortoj. Ĝus mi skribas kaj lernas en internet lecionoj. Se vi povas sendi min daŭri lecionoj. En mia patrolando havas ne esperanto krucoj kaj librojn, ĉar mi pensas, vi helpi min. Se vi helpi, bonvolu sendi al mi vian esperanto gramatikolibro kaj gazeto.

Sinjorino Bodshos.

suren nergui

<flower21036@yahoo.com>

Se iu leganto emas helpi nian samideaninon per tia helpo, ni petas vin rekte kontakti ŝin ĉe la adreso donita.

NIA NOVA KONKURSO

Nia lasta konkurso estis tre malfacila kaj ne ege amuza. Ĉifoje ni prezentas al vi ion pli facilan:

El la vorto *esperanto* kiom da vortoj po almenaŭ ses literoj vi povas fari? En *Aŭstria Esperanto-Revuo* (3/01) oni sukcesis fari la ĉisekvajn 23 vortojn:

ansero, aresto, arseno, aserto, Ernesto, espero, eterna, pantero, pasero, pastro, penetra, pentas, pentras, peranto, persona, portas, presanto, senpera, serena, serpento, sperta, teraso, tereno.

Ĉu vi povas fari ankaŭ aliajn?

Reguloj:

• Ĉiu vorto devas esti oficiala, aŭ konstruita el nur oficialaj radikoj.

• Vi rajtas uzi nur unufoje en unu vorto la literojn *s, p, r, a, n, t, o*, kaj dufoje la literon *e*.

• Via konkursaĵo devos atingi nin antaŭ la 10a de januaro 2001.

• Rajtas partopreni individuoj kaj grupoj.

Ĉiu konkursanto ricevos Esperantan libron kiel premion, kiun elektos la redaktoro..

La konkursanto kiu sukcesis konstrui la plej multajn vortojn rajtos elekti du librojn el listo provizota de la redaktoro. □



Skribas la Legantoj



Skribas Trevor Steele:

Saluton, Aŭstralio!

Jes, Panjo Ozilando, via vagemaj filo revenis al vi ekigi novan etapon de la vivo. Komence mi loĝos en Cairns kaj “la norda montaro”, la situo de granda parto de mia verkaro. Dank’ al la mirakla teĥnologio de komputiloj mi vivtenos min tie per tradukado/redaktado de tekstoj el diversaj mondopartoj.

Dum mia revenvojaĝo mi devis pasigi ok horojn ĉe la giganta flughaveno de Frankfurto-ĉe-Majno. Kiel ne enuadi?

Ha, neniuj problemoj — se oni havas eĉ meze bonan libron aŭ magazinon, oni povas facile atingi tiun modestan celon, ĉu ne? Konsentite, sed se oni survoje forgesis la okulvitrojn (ekzemple, en Vilniuso), legado povas esti vana batalo por fokusigi drivemajn literojn... Do kion fari? Unue, iom televidi. Sed la aparato kredis, ke la plej fascina afero en la tuta universo estas borsaj ciferoj kaj komerco ĝenerale. Mia intereso baldaŭ velkis.

Longe mi promenadis laŭ la senfinaj koridoroj de la multaj domoj. Mia ŝultro ne tre ĝuis la taskon daŭre porti la pezon de mia komputila valizo (en kiun mi ŝtopis multon por malpezigi la ceteran resendan bagaĝon...). Ankaŭ tiu sporto ne povis eterne kontentigi miajn animojn kaj korpon.

Devis esti io alia en la vivo. Ĝuste tiumomente oni anoncis, ke estos katolika meso en la kapelo, kiu sammomente eniris mian vidkampon. Ĉu fingromoveto de Supre? Mi decidis pasigi horon tiel.

Estis interesa lingva sperto. Kian

eklezian “komunumon” havus metropola flughaveno? Krom la pastro kaj du-tri monaĥinoj, la ĉeestantoj estis vere internacia grupo da trapasantoj, kiuj neniam vidis sin aŭ revidos. Kiel lingve kontentigi tiel hazarde estiĝintan grupon?

Grandparte rolas la lingvokapablo de la pastro. Tiu ĉi parolis kompreneble Germane, la Anglan (kun forta Germana akĉento, sed flue) kaj la Latinan (flue, sed kun forta Germana akĉento). Komence li anoncis la programon Germane kaj Angle. La bibliaj legaĵoj estis alterne en la Germana kaj la internacie pli uzata Angla. Oni kantis nur Germane, kaj la prediko, surprize ambicia kaj surprize longa, estis ankaŭ Germanlingva. Sed la katolika eklezio iam havis sian propran internacian lingvon kaj estas laŭ koncepto supernacia: por emfazi tiun universalan rolon la ĉefaj ritaj preĝoj aŭdiĝis Latine. (Mi miris, kiel senpene la frazoj uzataj antaŭ kvardek jaroj ruliĝis el mia propra buŝo. Kaj estis ankaŭ kvin-ses aliaj trapasantoj, kiuj partoprenis Latine — kiuj ili estis?).

Do, oni provis trilingve kontentigi la ĉeestantojn. Nemultaj pastroj kapablus tion hodiaŭ. Sed kio pri la Franclingvaj Afrikanoj kaj la Sudamerikanoj kaj la aliaj homoj, kiuj daŭre silentis, lingve handikapitaj?

Tiu “lingvopolitiko” spegulas tiun de la nunaj internaciaj instancoj. Oni provas, sed la rezulto estas nek justa nek tre efika. Devus esti ia pli racia solvo, ĉu ne?

La flugo estis tre longa, kara Panjo, sed mi ĝojas esti ree ĉe vi. □

Skribas Paul Desailly:

Karaj geamikoj

Unue, mi volas sciigi al vi pri miaj planoj en la sekvantaj jaroj. Mi ne intencas resti en Ĉinio pro tio ke mi ne scipovas la Ĉinajn lingvon kaj kulturon. Laŭ Angla esprimo mi havas stanan orelon (a tin ear), kio signifas ke mi ne kaptas diversajn tonojn de la Ĉina lingvo kaj mi scias apenaŭ unu ideogramon. Efektive, mi neniam intencis resti ĉi tie tre longe, jam pasis kvar jaroj ne inkluzivante kongresojn en 1992 kaj 1996, sed Bahaa Esperanto-Ligo ĝis nun estas malforte reprezentata en la Oriento generale kaj Ĉinio aparte.

Mi ĵus subskribis tre flekseblan kontrakton instrui la Anglan kaj Esperanton en Pekina Nacia Universitato. Mi aparte ĝojas, ĉar kondiĉo de mia nova kontrakto estas ke, kadre de mia labor-ŝarĝo, mi instruu oficiale la Zamenhofajn lingvon kaj porpacajn idealojn. Tiel por la unua fojo laŭ miaj ne malmultaj travivaĵoj en Ĉinio mi enspezas per Esperanto, almenaŭ parte — miraklon post miraklo!

Miaj proksimume 200 gestudentoj lernos Esperanton du horojn en ĉiu semajno, kondiĉe ke la lernado okazu per la Angla. Mi rajtas foriri je la fino de la unua aŭ la dua semestro. Espe- reble mi eltenos por reprezenti BEL- n en la 3a Azia Kongreso okazonta en Seŭlo post 12 monatoj.

Post tiu kongreso mi volas por ĉiam forlasi belan Ĉinion por pioniri en lando kie la Franca estas parolata, esperante ke pli junaj kaj fortaj BEL-anoj Ĉinaj antaŭenigos niajn Bahaajn aferojn. La ĵus okazinta 3a Nordorient-Ĉinia Kongreso de Esperanto estis bonege organizita kun proksimume 100 partoprenantoj

el naŭ provincoj de Interna Mongolio ĝis Guangxi, sed mi estis la sola eksterlanda gastulo.

Antaŭe en Ĉinaj E-kongresoj mi sukcese aranĝis Bahaajn kunsidojn, sed ĉiam kun iom da kaŝemo aŭ singardo flanke de enketantoj. En Hong Kong pasintan jaron, nia Bahaa renkontiĝo estis tute malferma afero, sed tiu urbego dum 50 jaroj restos sub aparta sistemo, krome en Hong Kong mankis granda interesiĝo pri Bahaaj aktivecoj; nur manpleno da aŭskultantoj. En Qingdao en 1992 nur private sed kompreneble laŭleĝe ni disdonis Bahaajn faldfoliojn, en 1996 en Shanghai mi citis publike kadre de la ferma ceremonio de la Unua Azia Kongreso vortojn de 'Abdŭl-Baha' pri universala helpa lingvo sen rekta aludo al la Majstro, en 1999 en la 17a Komuna Seminario en Pekino mi partoprenis viglan konversacian rondon en kiu religiaj temoj leviĝis dum relative longa tempo, kaj en Guilin en la 4a Ĉina Kongreso oni eĉ vendis Bahaajn librojn en la kongresa libroservo. Tamen ĉi foje, kiel vi povus ĝuste konkludi el la programo se vi tenus ĝin enmane, nia Bahaa afero estis tute alia.

Oni ne nur anoncis sed surbendigis kaj fiere fotis nian aranĝon, en kiu partoprenis eminentaj Esperantistoj el Ĉina Radio-Internacia kaj la Komunista Partio; iu profesoro provizis Ĉinan tradukon por la pli ol 20 ne-Bahaaj ĉeestantoj el pluraj regionoj. Oni dekoraciis per floroj, fotografajoj kaj muziko la salonon interrete menditan de BEL en Eŭropo. La kongresa prezidanto malgraŭ multaj devoj partoprenis dum duonhoron. Bedaŭrinde stoko de Bahaaj libroj el Frankfurto ankoraŭ ne atingis nin, do mi fotokopiis belan faldfolion kiun

mi kaj Trevor Steele (nova Akademi-ano) Esperantigis antaŭ 4-5 jaroj en Aŭstralio: “Kio Estas La Bahaa Kredo?” Se Dio permesos, post iom malpli ol tri monatoj en Kazakio kaj Uzbekio, laŭlonge de mia pilgrima vojo al la deklivoj de Monto Karmelo, mi plensukcese utiligos ilin.

Miaj gastoj ne timis libere preparoli ĉiajn demandojn kaj eĉ registris siajn nomojn, por ke mi poste sendu al ili pli da skribita informo. Alivorte kaj mallonge dirite, nia Bahaa renkontiĝo en kongreso grava en Ĉinio por la unua fojo, miaopinie, post “liberiĝo” en 1949 estis tute normala kaj libera kaj sendependa enketo pri la vero pri la Disendito por nia epoko.

Eble mi tro ŝarĝis min per kvarhora parolado, ĉar mia iskiatika malsano ankoraŭ ĝenas min sed tio ne tro gravas — la Changchunaj vetero kaj manĝaĵoj en somero estas agrablegaj kaj sanigaj. La programo konsistigis kvin diversajn partojn por ne tedi pro tro religiemaj temoj.

1: La egaleco de rajtoj inter viroj kaj virinoj.

2: La harmonio inter la scienco kaj vera religio, kun apartaj aludoj al profesoro Albert Einŝtein.

3: “La Bahaa Kredo Kaj Esperanto Realigantaj la Mondan Pacon” (t.e. mia propra libro, kiu lastatempe ricevis skribitajn laŭdojn de Ĉina poeto Mao Zifu, Kep Enderby, kaj Osmo Buller de UEA.)

4: Mondestroj kaj Esperanto. Fluso kaj malfluso de potencaj lingvoj.

5: Ĉu “artefarita” lingvo povas egali aŭ superi nacian lingvon rilate poezion?

Estus mirinde se ni povus sciigi al la tutmonda Bahaanaro kiel abunde benata la Internacia Lingvo estas por instrui kaj disvastigi nian amatan

Kredon. ‘Abdul-Baha’, Shoghi Effendi, elstaraj Manoj de la Afero de Dio kaj la Universala Domo de Justeco jam ripetfoje konfirmis skribe la benojn kiujn ĝi estas ricevinta. Kiam ni luktas por la Afero en la areno de universala helpa lingvo, ni atendu nenion malpli ol modernajn miraklojn.

Bahaame.

Paŭlo Desailly (Aŭstralio Bahaano rajtigita loĝi kaj enspezi en Ĉinio) □



POR RIDIGI VIN



“La perdita ĉapitro de la Libro de Genezo.

En ĝi, Dio demandis al Adamo: “Kio ĝenas vin?”

Adamo respondis: “Estas neniu kun kiu mi povas paroli.”

Dio diris ke li faros por Adamo kunulon kiu estos virino.

Dio diris: “Tiu persono kolektos manĝaĵon por vi, kiuos por vi kaj, kiam vi eltrovos vestojn, ŝi lavos ilin por vi. Ŝi konsentos kun ĉiu decido kiun vi faros. Ŝi naskos viajn infanojn, kaj ŝi neniam petos ke vi ellitiĝu dum la nokto por zorgi pri ili. Ŝi ne riproĉados vin kaj ŝi ĉiam la unua konfesos ke ŝi malpravas kiam vi kverelos. Ŝi neniam havos kapdoloron kaj ŝi libere donos al vi amon kaj pasion kiam ajn vi bezonos ĝin.”

Adamo demandis al Dio: “Kiom koston tia virino?”

Dio respondis: “Brakon kaj krucon.”

Adamo pensis dum iom da tempo.

Post tio li demandis: “Kion mi povas akiri kontraŭ unu ripo?”

[tr. Dorothy Bysouth,
kun helpo de la Grupo de Oakleigh] □

2002 Somerlernejo ĉe Perto

ĈU VI EMAS AL FERIO? Venu por kunveni kun ni ĉe Perto (Perth) por ĝui du semajnojn da studado, amuzo kaj amikeco ĉe la 18a Aŭstralia Esperanto Somerlernejo. Ĝi okazos ĉe bonega situo superrigardanta la Riveron Cigno, nur mallongan promenon for de Parko de Reĝoj.

Esperanto Ligo de Okcidenta Aŭstralio, 33 Moore Street, East Perth 6004.

Email: esperanto@iexpress.net.au

Retpaĝo:

www.iexpress.net.au/~esperanto

EKZAMENOJ: Partoprenantoj de la 2002-Somerlernejo rajtos kandidatiĝi pri la Baza, Meza, kaj Alta Ekzamenoj. Ĉiuj kiuj intencas kandidatiĝi por la Alta Ekzameno kontaktu Marcel Leereveld-on antaŭ januaro.

LERNOLIBROJ: Marcel Leereveld rekomendas la ĉisekvajn lernolibrojn:

Niveletoj 3 & 4: *Por ĝuste uzi Esperanton.*

BAZA:

Gvidlibro por unuaj Ekzamenoj.

Studa Libro por la Baza kaj la Elementa Ekzamenoj.

MEZA:

Gvidilo por la ses ekzamenoj.

Studlibro por la Meza, la Supera, kaj la Alta Ekzamenoj. □

Helpopeto por funkciigi la Projekton "Per-A-Por-E"

Saluton, karaj samideanoj!

En ĉi-letero ni petas vian helpon por funkciigi la projekton "Per-A-Por-E", kiun iniciatis la Jilin-provinca Esperanto-Asocio en Ĉinio.

Kio do estas "Per-A-Por-E"? Ĝi signifas "Pere de Anglalingva instruado, por Esperanta disvastigado".

Eble tuj al vi venas la demando: Kial vi intencas disvastigi Esperanton pere de Anglalingva instruado? Ni prezentu per ekzemploj por la klarigo:

1. Almenaŭ ĉiuj lernantoj en Ĉinio devigate lernas la Anglan ekde sia 13a jaro ĝis sia 18a jaro; se ili studos en altlernejo, tio ankoraŭ daŭros 3-4 jarojn;

2. En kelkcent urboj en Ĉinio, multaj gepatroj pagas por ke ilia sola fil(in)o lernu la Anglan de sia infaneco;

3. Ne nur la Pekina sed ankaŭ aliaj urbaj registaroj jam oficiale funkciigis la projekton "Ĉiuj urbanoj lernu la Anglan". Tiu ĉi situacio pri la An-

glalingva instruado en Ĉinio tamen provizas bonan oportunon por ke ni profitu de ĝi por disvastigi Esperanton. Tio estas, ni povas inviti Anglalingvajn instruistojn Esperantistajn de aliaj landoj, kaj dum ilia instruado ili povas ankaŭ komprenigi Esperanton al siaj lernantoj, kaj, plie, ili povas ĉeesti lokajn Esperanto-renkontiĝojn, aŭ instrui Esperanton en Esperanto-kursoj.

Tio ne estas fantazio, ĉar lastjare laboris en Ĉinaj universitatoj kelkaj alilandaj instruistoj Esperantistaj, ekzemple S-rino Robin (el Usono), ĝesinjoroj Johano (el Aŭstralio), S-ro Rode (el Britio) kaj S-ro Paŭlo (el Aŭstralio), kiuj starigis Esperanto-kursojn en la universitatoj kie ili laboris, vikle partoprenis en Ĉinaj Esperantaj kunvenoj, kaj valore kontribuis al la Ĉina Esperanto-Movado.

Jen la ĉefaj punktoj de la projekto "Per-A-Por-E":

1. Nia asocio finance funkciigas la

projekton dum ĝia komenca periodo;

2. Ni provizas senpage al la invititaj instruistoj Esperantistaj loĝadon kaj manĝadon;

3. Ni pagas al ili rekompenccon, ne altan tamen taŭgan;

4. Ni arangas ĉiujn aferojn rilate al la loka registaro;

5. Ni administras la projekton por ke ĝi finfine fariĝu memstara finance.

Poste? Popularigi la praktikon tra Ĉinio.

Karaj samideanoj, por bone funkciigi la projekton ni jam detale planis kaj sufiĉe preparis. Nun ni intencas

unue inviti 4-8 Anglalingvajn instruistojn Esperantistajn el aliaj landoj.

Kompreneble, ili devas esti kompetentaj instruistoj kaj de la Angla kaj de Esperanto. Kiu interesiĝas pri tiu ĉi projekto "Per-A-Por-E", bonvolu kontakti nin por plia informiĝo.

Ĝispint, la ĝenerala sekretario de Ĉina Jilin-provinca Esperanto-Asocio P.O. Kesto 1162, Ĉangĉun, CN-130021, Ĉinio

Retpoŝto: kokosoto@263.net

kokosoto@163.net

TTT: <http://www.kokosoto.org/> □

Renkontiĝo en Auckland je la 3a de oktobro 2001

Aŭklandaj Esperantistoj havis okazon bonvenigi la prezidanton de AEA Jenny Bishop kaj ŝian edzon Alan Bishop kiam ili vizitis la urbon. Dum la vespermangxo kaj poste, i.a. Jenny raportis pri sia sperto ĉe la ĉi jara UKo en Zagrebo. Ni diskutis iom pri la nuna situacio de la movado. La graveco de tia avangarda projekto kia "Indiĝenaj Dialogoj" kaj la starigo antaŭnelonge de Komisiono por Agado en Oceanio estas evidenta.



Staras de maldekstre: Alan Bishop, Dennis Pease, Kris Krageloh, Brian Fox, Bradley McDonald, Ian Jones, Max Clift.

Sidas: Jackie Fox, Howard Gravatt, Jenny Bishop, Neelam McDonald, Roy Patterson, Marcel Patterson.



Gramatika angulo



Kio estas komplemento? de Marcel Leereveld

Komplemento estas vorto, aŭ kombinaĵo de vortoj, kiu difinas aŭ aldonas informojn al *substantivo*, kaj kelkfoje al pronomo, infinitivo, adjektivo, adverbo, aŭ numeralo.

Epiteto

Kun substantivo:

La hundo *granda*
 La hundo *tie*
 La hundo *bojanta*
 La hundo *ĉi tie*
 La hundo *tre granda*
 La hundo *bojanta la tutan tagon*
 La hundo *taŭga por defendi nin*
 La hundo *batita de la knabo*
 La *kvar* hundoj
 Tiaj hundoj

Kun pronomo: Li *sola*

Kun numeralo: Kvar parolantaj

Kun infinitivo: Manĝi *rapide*

Kun adjektivo: Grande *valora*

Kun adverbo: Neimageble *rapide*

Suplemento

Kun substantivo:

Ka hundo *en la ĝardeno*
 La hundo *de mia najbaro*
 La hundo *por nia fratino*
 la hundo *sen ili*
 La hundo *por du*
 La hundo *por protekto*
 La vojaĝo *al Brisbano*
 La vojaĝo *Brisbanen*

Kun pronomo: Ŝi *kun la granda ombrelo*

Kun numeralo: Kvar *el ni*

Kun infinitivo: Manĝi *ekster la domo*

Kun adjektivo: Feliĉa *pro la geedziĝo*

Kun adverbo:

Tiom *da pomoj*

Promenante du horojn

Suborda propozicio

Kun substantivo:

La hundo *kiu bojas*

La hundo *por kiu ni pagis cent dolarojn*

La hundo *pri kiu ni zorgis dum la tuta tago*

Tia hundo *kian ni plej ŝatas*

La hundo *kies nomon mi ne scias*

La tago *kiam ŝi dekokjariĝis*

La kvanto *kiom ni bezonos*

La maniero *kiel grimpi sur arbon*

La tialo *kial ŝi revenis*

La urbo *kie mi naskiĝis*

La fakto *ke li foriris tro frue*

Kun pronomo:

Ŝi, kiu nun *dormas*

Tio kio kuŝas *sur la tegmento*

Kun numeralo: Kvin *kiujn ni elektos*

Kun adverbo:

Tiel *kiel lia patro pentris*

Tro *rapide*, kio ne estas permesita

Kun infinitivo: Manĝi, *por kio nun ne estas tempo*

Kun adjektivo: Plenege *kiel oni ne povas imagi*

La formoj (ne la funkcioj!) kiujn povas alpreni la funkciaĵoj Komplemento, Subjekto, Predikativo, Objekto, kaj Adjekto, estas aŭ la Suplemento aŭ la Epiteto (inkl., en Esperanto, la t.n. reduktitan subpropozicion: La hundo *manĝinta hieraŭ la kokidon*), aŭ la Suborda Propozicio. Jen detal-

eta diagramo de la formoj kaj funkcioj:

Formo: Funkcio ↓	→ Epiteto	Suplemento	Suborda Propoz.
Komplemento:	La birdo <i>akva</i>	La birdo <i>sur la akvo</i>	La birdo <i>kiu naĝas surakve</i>
Subjekto:	<i>Manĝi nun</i> ne decas	<i>Sur la roko</i> montr- iĝas ĝia pozicio	<i>Ke li ne akceptis</i> , mirigis ĉiujn
Predikativo:	Ŝi restas <i>parol-anta</i>	Mi prenis la dan- ĝeron <i>por ŝerco</i>	Li konstruis ĝin, <i>ke ĝi similas al boato</i>
Objekto:	Ili deziras <i>manĝi</i> Ili trinkis <i>multe da vino</i>	Ni prenis <i>de la kukoj</i> .	Mi scias <i>ke li estas malsana</i>
Adjekto:	Ili trinkis <i>rapide</i>	Ili trinkis <i>en la ĝardeno</i>	Ili drinkis <i>ĝis ili ebriiĝis</i>

Notu: Ili alparolis LA VIRINON *en la akvo* = Komplemento = la virino estis en la akvo, kaj ili ne estis;

ILI ALPAROLIS la virinon *en la akvo* = Adjekto = ili estis en la akvo kaj tie alparolis ŝin, kiu estis jes aŭ ne en la akvo.

Por esti nemiskompreniga, uzu por la Adjekto: “Ili alparolis en la akvo la virinon”, kaj por la Komplemento: “Ili alparolis la en la akvo virinon” aŭ “...la virinon estantan en la akvo”.

Speciala postnoto por gramatikistoj

Kelkaj gramatikistoj (i.a. PAG) nomas “komplemento” ankaŭ la aliajn Determinantojn en la propozicio, sed tio ne estas saĝa, ĉar:

1^a Tiuj Determinantoj jam havas specialan nomon por sia funkcio (Komplemento indikas *funkcion*, ne formon): Objekto, Adjekto, Predikativo;

2^a. Ankaŭ la Predikato estas Determinanto, de la Subjekto (eĉ kie mankas subjekto, malofte), do devus nomati Komplemento, laŭ ilia rezonado.

3^a. Komplemento diferencas de la aliaj (Objekto, Adjekto, Predikativo) en tio ke ĝi ĝenerale ne formas parton de propozicio (escepte kie forlastitas la antecedento: “(la fakto) ke li foriris ne plaĉis al ni”); ĝi formas nur parton de Parto de la Propozicio; ĝi do ĉiam estas parto de *aŭ* la Objekto, *aŭ* la Adjekto, *aŭ* eĉ alia Komplemento (la Predikativo estas parte memstara frazparto kaj parte ne, do specialaĵo, ĉar ĝi difinas samtempe la verbon kaj la subjekton aŭ objekto).

La Anglaj gramatikistoj eĉ nomas la

Komplementojn, malĝuste, memstaraĵoj en la propozicio, ne formantaj parton de subjekto aŭ objekto aŭ adjekto. □



POR RIDIGI VIN



Brita Eksterlanda Ministro George Brown estis iomete ebria post trinkado de kelkaj elstare bonaj vinoj ĉe ŝtata vespermanĝo en Vieno en 1966. Kiam la orkestro komencis ludi, li tenis la manikon de la gasto apud li, kreitaĵo vestita per fajna silko.

“Sinjorino” li deklaris. “Vi aspektas rave alloga, ĉu vi volas danci kun mi?”

La gasto okulumis lin kalme kaj diris, “Ne S-ro Brown, pro tri kialoj. Unue, ĉi tio estas ŝtata vespermanĝo, ne balo. Due, eĉ se estus balo kaj ne ŝtata vespermanĝo, tio ĉi ankoraŭ estus la nacia himno de Aŭstrio, ne valso. Kaj trie, eĉ se ĉi tio estus balo kaj ne ŝtata vespermanĝo, kaj se tio estus valso kaj ne la nacia himno de Aŭstrio, mi ankoraŭ estus la Kardinala Ĉefepiskopo de Vieno!”

Kontribuis Dennis Pease □



Ligo de Instruistoj



informas Jennifer Bishop

La tempo alvenas por ĝui Zamenhof-feston, sed samtempe ni serioze pripensu la agadon de AEA kaj Esperanto-Federacioj en Aŭstralio. La nova strategia plano de UEA konsistas el ses ĉefaj elementoj prilaborendaj:

informado, instruado, planado, utiligado, profesiigo kaj juniĝo

Kvankam ĉiuj gravegas, la vicordo estas komprenebla. En antaŭa mesaĝo mi proponis ke pro la nuna situacio en Aŭstralio, ni helpu al niaj najbaroj kies ĉefa lingvo ne estas la Angla. Tio povus indiki fekundan terenon por ke indiĝenaj popoloj ekinteresiĝu kaj lernu Esperanton.

Tamen tiu propono ne kaŝas la gravan fakton ke pro diversaj videblaj kialoj: regado de la Angla lingvo, enmigrado, izoleco, kaj la distanco for de Eŭropo, Esperanto eĉ ne estas sufiĉe konata de Aŭstralianoj mem.

Sen diskonigi la lingvon ne eblos plivastigi la lernadon en kaj ekster lernejoj, kaj niaj amikaj kaj interesataj najbaroj komencos dubi niajn intencojn se ne eblos montri progreson je informado kaj instruado.

Informado kaj instruado estu niaj ĉefaj celoj! La estraro de AEA, la Esperanto-Federacioj kaj ILEI-sekcio kaptu ĉiun eblan okazon por informi nacie kaj regione, sed nia plej videbla montrovitrino estas la Australia Esperanto Somerkursaro.

La 18a Aŭstralia Somerkursaro de Esperanto okazos la 5-18 an de januaro 2002, la unuan fojon en Perto, Okcidenta Aŭstralio.

Aliĝilo troviĝas ĉe la retejo: www.iexpress.net.au/-esperanto. Mi scias ke Esperantistoj en Perto laboregas por aranĝi interesan progra-

mon de instruado kaj distraĵoj, invitante profesiajn internaciajn instruistojn kaj planante belajn ekskursojn en la ĉirkaŭaĵo.

Ili ankaŭ prizorgas le komforton de la partoprenontoj ĉe Kolegio de Sankta Georgo de Universitato de Okcidenta Aŭstralio.

Dum la organizantoj klopodas allogi plejparte lokajn interesatojn, estas alies devo ne nur mem ĉeesti sed ankaŭ persvadi amikojn kapti ĉi tiun unikan oportunon.

Ne permesu al la teroristoj influi vian decidon ĉar tiam ili kun ĝojo povos festi venkon.

Ni esperu ke la flugkompanioj povos proponi eĉ pli da flugoj al Perto kaj se temas pri manko de mono, aranĝu konkurson kun premio por ebligi almenaŭ unu reprezentanton de ĉiu Esperanto-klubo en Aŭstralio ĉeesti.

Post interkonsulto kun ĉiuj estraranoj de AEA, inkluzive la provincajn reprezentantojn, ni ĉiuj konklude konsentas ke gravas certigi laŭeble la ĉeeston de ĉiuj oficistoj ĉe la AEA Jarkunveno kaj diskut-rondo por interkonsenti pri politikoj, pri ties financado, kaj praktika prilaborado. Tiucele, AEA nun proponas subvencion al ĉiu el la ses oficistoj.

Mi certas ke rezulte de ĉi tiu nova politiko ne nur la AEA-membraro sed ankaŭ Aŭstralio kaj Esperanto mem ricevos estontece pli bonan servon.

Intertempe mi kaptas la okazon deziri al ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj, al ĉiuj legantoj de nia tre leginda gazeto, speciale al ties redaktoro, kaj al ĉiuj viaj familianoj, ĝojigajn festotagojn en paco kaj sano kaj espero! □



POR RIDIGI VIN



Kiel kapti kuniklon

Oni petis de LAPD, FBI kaj CIA ke ili pruvu ke ili plej bone scias kiel kapti krimulojn. La prezidento ellasis blankan kuniklon en arbaron, kaj ili ĉiuj devis kapti ĝin.

Enarbariĝas CIA. Ili havas bestosplionojn ĉie en la arbaro. Ili pridemandas ĉiun planton kaj beston. Tri monatojn poste ili konkludas ke kunikloj tute ne ekzistas.

Eniras FBI. Ĉar ili trovas nenion post du semajnoj da intensa serĉado, ili bombardas la arbaron mortigante ĉion kaj ĉiun, ankaŭ la kuniklon. Ili ne petas pardonon; la kuniklo estis traktita laŭ sia merito.

Eniras LAPD. Du horojn poste ili eliras kun ĝissange batita urso. Kriegas la urso: “Jes kompreneble, mi estas kuniklo, jes, mi konfesas ke mi estas kuniklo.”

Aŭdis pri tio Johano Howard. Li decidis testi la Aŭstraliajn agentojn kontraŭ krimo. Li ellasas blankan kuniklon en arbaron ekster Kanbero.

Eniras la Viktoria polico. Dek kvin mjnutojn poste ili revenas kun dispaŝitaj koalo, kanguruo, kaj filiko. “Ili aspektis kiel danĝeraj kunikloj, kaj ni devis defendi nin” estis ilia pardonigo.

Eniras la NSK-polico. Vidbendoj poste montris ebriegajn oficiojn alt-rangajn dancantajn kun kunikloj ĉirkaŭ eŭkalipto.

Eniras la Kvinlanda polico. Baldaŭ poste ili revenas veturigante tute novan Mercedes-Benzon, kun duonnudaj kunikloj pendantaj de la fenestroviŝiloj. Gratulas ilin la Kvinlanda ĉefministro pro ilia bona kompreneo de familiaj valoroj.

La Nacia Kriminstanco ne povis

kapti la kuniklon, sed promesis ke se oni donos al ili pli da mono, ili povos gajni \$90 000 000 de la kuniklo, ĉar ĝi neniam pagis impostojn.

La Okcidentaŭstralia polico eniris la arbaron kaj kaptis la blankan kuniklon, sed tiu neklarigeble pendigis sin dum la policisto eliris unu momenton por prepari al si tason da kafo.

Kuniĝis la policoj de Nordteritorio kaj Sudaŭstralio por mortbati ĉiujn kuniklojn en la arbaro escepte de la blankaj. Ili bone scias ke nur la nigraj kaŭzas problemojn.


La federacia polico de Aŭstralio rifuzas eniri la arbaron. Ili ekzamenas la demandojn, precipe la kostojn, kaj decidas ke aliaj aferoj pli gravas, kaj ke ne troviĝas sufiĉe da mono por ĉion fari. Ili fine rekomendas ke la tuta afero estu resendita al la departemento de kiu ĝi venis, por plia priekzamenado.

Kaj ASIO eniras malĝustan arbaron.

(El *Tamen Plu* marto 2001

kaj *Teloŝeo* septembro 2001) ☐

Lastatempe aperis:



Tradukis: Donald Broadribb
Eldonis: Sezonoj, 2001

Krioj sur deklivoj de Stefan kaj Hajnal MacGill

Kvindek ses infanaj vojoj sufiĉis por laŭte proklami la grandecon de la Infana Kongreseto okazinta samtempe kun la Universala Kongreso en Zabrebo.

La infanoj pasigis semajnon en Grad Mladik (Infana Urbo) sur la herbejoj kaj arbaraj deklivoj de la Ursa Monto.

La fortoj de la kvin gvidantoj kune kun simila nombro da helpantoj estis streĉitaj por provizi buntan programon por okupi kaj kontentigi ĉion, precipe pro la tre (tro?) granda aĝgamo. Tamen, bunto kaj abundo estis:

Grupo lernis nodojn kaj konstruis arbo-kabanon, alia flugigis kajtojn, alia modelumis el argilo, aliaj konstruis pupojn post rigardo al pup-teatro, iuj kantis, pliaj kunmetis bidadajn kolĉenojn.

Vestigi sin per kimono estis ebleco, kiel ankaŭ pluki florojn kaj pretigi bildojn el la petaloj. Varmaj posttagmezoj pleniĝis per laŭstadia freneza olimpiado, trezor-serĉado, drako-ĉasado, mini-golfo kaj aliaj sportaĵoj.

Vesperojn okupis magia spektaklo de Trixini, rostadon de cilindropanoj ĉe komuna fajro kaj adiaŭa koncerto por kiu multaj pretigis erojn.

Ekskursoj gvidis la gregon al UK, al etnografia kaj teknika muzeoj kaj al cikonia vilaĝo. La infanoj venis el dekkvin landoj, do la lingva diverseco multis. La duono regis nian lingvon denaske aŭ simile, pli ol kvarono povis adekvate paroli, nur ĉe malmultaj mankis sufiĉa parolkapablo


Sufiĉe da oficiala raportado, ni aŭdu unu voĉon (9-jaran) el la montoflanko, per starigo de la kutima

[por ne diri ŝablona] demando “Kion vi ŝatis pri la IIK?”

Respondo: “Mi povis ludi kun la katoj, kaj estis multa libera tempo. Tamen estis multaj programoj kaj bonaj konkursoj, estis bone fari bildojn el florpetaloj, kiujn ni mem kolektis, manlaboroj estis bonaj – la argilaj figuroj. Ni ŝatis prepari skeĉojn, estis bona la paraŝuta ludo, mi ne ŝatis la ekskursojn, ĉar ni devis longe sidi en busoj kaj multe promeni [fakte, mallonge kaj malmulte, sed tamen.] Neniam per buso. Per vagonaro aŭ aviadilo, aŭ pramo, jes, io ajn, sed ne buse. Estis bone esti en grupo [kun samaĝaj knabinoj]. La grandaj knaboj ne tro ĝenis nin.”

La ceteraj kvindek kvin sendube havas proprajn prijuĝojn, sed kiel tiom da deklivaj krioj prezenti?

[El *Tamen Plu*, oktobro 2001] □



Erik, Karina, kaj Ĝo Turvey

Post longa atendo, ni povas prezenti foton pri la nova Turveyido Karina (naskita la 8an de julio), pri kiu ni jam raportis en antaŭa numero. La knabino kaj ŝia frato Erik aspektas egale ĉarmaj kiel la fieraj patrino¹, al kiu ni reesprimas gratulon. □

¹ Kaj ankaŭ ŝia patro, nevidebla en la foto?

Odlo Bekserp: Liaj paĝoj

Mia amiko Diplodoko, kiu multjare kutimis kontribui al nia tutuniverse legata kaj premiata revuo, bonvolis sendi al mi ĉerpaĵon el *Turkey: a Travel Survival Kit* de Tom Brosnahan, unu el la libroj en la serio LONELY PLANET TRAVEL SURVIVAL KITS. La teksto diras, i.a.:

In 1928, Ataturk did away with the Arabic alphabet and adopted a Latin based alphabet much better suited to easy learning and correct pronunciation. He also instituted a language reform to purge Turkish of abstruse Arabic and Persian borrowings, in order to rationalise and simplify it. The result is a logical, systematic and expressive language which has only one irregular noun (*su*, water), one irregular verb (*etmek*, to be) and no genders. It is so logical, in fact, that Turkish grammar formed the basis for the development of Esperanto.



Ataturk

ATATURK signifas “patro de la Turkoj” kaj estas la honornomo donita al Mustafa Kemal (1881-1938). Sen-dube, eta Mustafa estis iom maldiskreta, ĉar evidente li flustris al sia koramiko Ludoviko Lazaro la sekretojn de sia estonta Turka lingvoreformo. Kaj senhonte L.L. decidis publikigi propranome Esperanton en 1887, kiam ATATURK-eto estis nur sesjara kaj nekapabla publike protesti. Estas utile scii tiujn kaŝitajn sekretojn de la historio, ĉu ne? (Ĉu iu dubemulo aŭdacas paroli? Fi!)

Intertempe multaj legantoj miaj

petis vidi ankoraŭ pli da fotoj el la unua kongreso de la TPEA. Do:



Fondantoj de la Junulara Grupo

Ĉimaldekstre vi vidas la fotojn kiujn mi faris pri la du fondantoj de la nova Junulara Grupo: P-ido Ato kaj P-ido Ito.

Ili ankaŭ konsterniĝis pri la ĉisuba raporto kaj petis min fondi la societeton EKSA pri kiu vi postĉisube legos...

Mi legis en la revuo *Folioj de Katamikaro* (2001/2) pri Usona kompanio TRANSGENIC PETS ke:

Utiligante teknikojn de genetika inĝenierado kaj klonadon, la sciencistoj de la entrepreno laboras por generi la unuan katon 100% nealergiigan, idealan kunulon, kiu ne plu ternigos aŭ kaŭzos astmokrizon...[Oni] klarigas ke la alergi-ojn ligitajn al katoj kaŭzas ununura proteino...La genetikistoj jam izolis la genon, baptitan Fel D1, respondecan pri la sintezo de tiu proteino.

Alian solvon proponas Japana firma BANDAI per sia katroboto, nun vendita post la furora sukceso de ĝia hundroboto:



foto: Bandai

Pro ĉi tiu atenco kontraŭ la digno de ĉiuj niaj katlegantoj (da kiuj estas multegaj, kvankam nia amoplenega

kompatemega ĉionsciega ĉiam-estulaŭdatega Reaktoro konstante neas tion), mi kun la helpo de P-ido Ato kaj P-ido Ito (kiuj, pro sia nekompareble valora servo al la Felida gento, estas nomumitaj Honoraj Kataranoj) nun fondas la Esperantistan Katar-Societon Antarktikan (EKSA), en kiu rajtas aniĝi ĉiuj ternantaj katoj de la mondo. Ĝiaj celoj estas kungrupigi ĉiujn ternantajn katojn de la mondo, miaŭigi ilin Esperante, kaj provizi al ili nemanĝeblajn ludilojn. Bonvolu anigi vian terneman katon. Kontraŭ kotizo de nur sepdek eŭro-panoj, ĝi ricevos, senpage, musroboton, kiu plezurigos ĝin dum multaj oraj horoj (= hororoj) da ternoplena ĉasado.



Lastamencie: En *Esperanto aktuell* mi legis pri komercolaboro de honora kolego mia:

Pro la manio uzi Anglajn nomojn por ordinaraĵoj por ŝajnigi ilin novaj kaj furoraj, du grandaj Germanaj magazeno-organizaĵoj ofertas tekono kun rimeno kiel "body bag". Tamen tiu vorto jam ekzistas en la Angla, kaj precipe soldatoj bone konas ĝin: temas pri *kadavrosako* por forporti mortintojn.¹

Nia Reaktoro fine permesis al mi elekti la kovrilpaĝan bildon por ĉi tiu numero de *ESK*, do mi decidis favore al la pelikanida foto, kiu aperis en *The Sunday Times* de Perto, la 16an de septembro. Laŭ la ĵurnalo, tri sovaĝaj pelikanoj senaverte elektis la Bestoĝardenon de Perto kiel taŭgan akulejon ĉijare. Unu gepatra paro elkovis tri bebojn, alia patr(in)o je la



Fotis Gary Merrin

Patr(in)o manĝiganta siajn bebojn.

16a de septembro ankoraŭ kovadis ovon.

La Bestoĝardenistaro zorgas ne tro proksimiĝi al la du familioj, sed donas al ili manĝaĵojn kvarfoje ĉiutage. Ili anticipas ke la familioj forflugos, post sufiĉa maturiĝo de la infanoj.



Kaj laste, ankaŭ foto prenita el *Telopeo*: 4jara Elissa Webb Manley manĝiganta valabion per kasuarina folio (28-1-00).

¹ *Esperanto aktuell* 3/01, p20

Malformalaj esprimoj de la drumisto de Dolcxamar

En la reto aperis longa listo de esprimoj por ĉiutagaj malformalaj esprimoj (la aŭtoro nomis tion “stratslango”). El tiu listo via redaktoro ĉerpis aron da ĝenerale utilaj esprimetoj, kaj inter rektaj krampoj metis komentojn proprajn. La kompleta listo troviĝas ĉe <http://www.nettie.fi/droEspo>

Ĝeneralaj

Saluton...Ĝis — *Hello...Goodbye*
 Hola!, Hej!, Ĉaŭ! — *Hi! Bye!* [Ĉaŭ estas Ital-devena neoficiala esprimo nuntempe multe uzata. [“hola” kaj “hej” estas neoficialaj radikoj]
 Kio nova? = *What’s new?*
 Kio okazas? = *What’s happening?*
 Kiel marŝas?, Kiel zumas? = *How’s it buzzin’?*
 Ĉu klakiĝas?, Ĉu glatas? = *Is it going alright?*
 Ni vidos! = *See you*
 (Notu: Ni vidu = *Let’s see*)
 Ĝis kaj kis! — *Bye!*
 Bonvolu — *Please*
 Plaĉu! = *Please!*
 Ja = *Yeah*
 Enorde, E.O., Okej’ = *OK* [“Okej-” estas neoficiala radiko]
 Ne malbona, Enorda, Okej’
 Dank’ = *Thanks*
 Neŝvite = *No sweat*
 Neniel! = *No way!*

Eco...Omo — Quality...

Quantity

Iel tiel = *So-so*
 Pli-malpli bone = *More or less well*
 Glate = *No Problem*
 Bonege! = *Really well*
 Ege Bone!; Terure Bone! = *Awesomely*

well

Inerte = *Slackly*
 Mise (Malĝuste) = *wrong*
 Vile, Dure (Malfacile) = *Tuggy, Hard*
 [“dur-” estas neoficiala radiko]
 Ŝvite (Malĝate) = *with difficulty*
 Merde = *Like shit* [“merd-” estas neoficiala radiko]
 Aĉe = *Like hell*
 Lacega, Elĉerpita = *Knackered*
 Mi estas en finalo = *I’m dead tired*
 La tabako estas en la finalo = *I’ve run out of tobacco*
 Tio estis lia finalo / fino de lia latino = *That was the end of his story*
 [“latin-” estas neoficiala radiko]
 Soifega, Drenita = *Parched* [“dren-” estas neoficiala radiko]
 Mi malsategas = *I’m starving*
 Beki (Manĝi) = *Eat*
 Bekaĵo = *Grub*
 Sengroŝa, Senmona = *Skint, broke*
 Ĉio en ordo = *All right*
 Superbe!, Brile! = *Great! Brilliant!*
 [“superb-” estas neoficiala radiko]
 Suverene! = *Outstanding!* [“suveren-” estas neoficiala radiko]
 Ekscite! = *Exciting!*
 Kalme, Nete!, Pimpe!, Fere! = *Cool!*
 Prenu kalme = *Keep a straight face*
 [Notu: “kalm-” kaj “pimp-” (= “sexy”) estas neoficialaj radikoj.]

Sovaĝe! = *Wild! Scary!*
 U-ra!, Hu-ra! = *Hoorah!* [“ura” estas neoficiala radiko]
 Ho mia!, Kristo! = *Oh Dear!, Christ!*
 Nu ja = *Oh well*
 Tede, Enuige = *Boring*
 Makzele — *Chattering*
 Kio misas? = *what’s wrong?*
 Ne gravas, Forgesu = *Not to worry, never mind*
 Egalas = *It makes no difference; I don’t care*
 Fekegalas = *I don’t give a damn* [Notu: “fek-” estas neoficiala radiko.]
 Ajne, Kiel ajn (Senorde) = *whatever*
 Ĉiukaze, Tamen = *Anyway, however*
 Hazarde = *By chance*
 Alie, Parenteze = *By the way*
 Teme pri tio = *Talking of which*
 Flanke, Temo al temo = *Changing the subject*
 Vidu = *Look*
 Vidu, estas absurde = *Look, this is madness*
 Konsentite! = *It’s a deal!*
 (Ek)Vidu!, Kontrolu! = *Check this out!*
 Okulumu! / Orelumu! / Nazumu! / Fingrumu! = *Check out! (with one’s eyes / ears / nose / fingers)*
 Ne maltrafu! = *Don’t miss out*
 Eh?, Ki..?, Kion? = *what?, Eh?* [“eh” estas neoficiala radiko]
 He... = *Er...*
 Vi Blagas! = *You’re Kidding!* [“blag-” estas neoficiala radiko]
 Kalme — *Cool* [“kalm-” estas neoficiala radiko.]
 Nestreĉa = *Easygoing, relaxed*
 Bonulo = *Good chap*

Kalma ulo = *Cool guy* [“kalm-” estas neoficiala radiko.]
 Ŝika = *Posh, Chic* [“ŝik-” estas neoficiala radiko.]
 Ĉarma = *Really nice, wonderful*
 Fera = *Really good, tough*
 Ferega sono, amik’! = *Tough sound, man!*
 Spica = *Tangy, Colourful*
 Frapa = *Effective*
 Stulta = *Corny*

Bube — Gangs

Kliko = *Gang* [“klik-” estas neoficiala radiko.]
 Klikano = *Gang member* [“klik-” estas neoficiala radiko.]
 Bubo = *Brat, Guttersnipe*
 Pasumi (Umi) = *Hang around*
 Foseti nazon = *Pick one’s nose*
 Kraĉi = *Spit*
 Getoskuilo = *Ghetto blaster* [“get-” (en PIV) “gett-”) estas neoficiala radiko.]
 Parafo = *Tag*
 Trafali en ekzameno = *Fail an exam*
 Kaŝ-slipeto = *Crib*
 Blufi (en ekzameno) = *Cheat in exam* [“bluf-” estas neoficiala radiko.]
 Esti / Sidi profunde en kaĉo / merdo = *Be deep in trouble / shit* [“merd-” estas neoficiala radiko.]
 Defingri, Pinĉi (Ŝteleti) = *Pinch, pilfer* [“pinĉ-” en ĉi tiu senco estas plivastigo de la 4a senco en PIV.]
 Fumi = *Smoke*
 Duigi = *To twos*
 Stumpi = *Stub out*
 Nikotinskuiĝo = *Nicotine withdrawal symptoms*

Snuvo = *Snuff* [“snuf-” estas neoficiala radiko]

Drinki = *Drink alcohol*

Ebria, Vaporumita = *Drunk*

Bone Ŝargita = *well loaded*

Umita = *wasted*

Postebrio = *Hang-over*

Mensa postebrio = *Mental hangover*

Rompita, Distondita = *Broken, screwed up*

Eksa (Rompita, Malfunkcia, Disa) = *Broken (thing, machine)*

Vomi = *To puke*

Vomaĵo = *puke*

Stratbatale – Street Fighting

Draŝi, Stufi, Elbati = *Rough up* [stuf- “stew” estas neoficiala radiko.]

Mi frapis lin sur la flanon = *I gave him a knuckle sandwich* (Or: “*I smashed him in the pancake*”)

Mi pugnumos vian vizaĝon! = *I'll beat your face shapeless!*

Pugno-feraĵo = *Knuckle-duster*

Ek! = *Let's go!; Go get it!*

Arde – Upset

Diable!, Infore!, Damne!, Sakre!, Merde!, Merdon!, Fek!, Sterko!, = *Damn!, Hell!...* [“damn-”, “sacr-”, “merd-”, kaju “fek-” estas neoficialaj radikoj]

Mi merdas sur tion = *I don't give a shit about it*

Mi fajfas pri vi = *I don't give a damn about you*

Iun tagon mi eksigos lin = *One day I'll finish him*

Muzeli, Buŝegi (Ludi la buŝon al iu) = *To lip, give lip*

Akri, Bojaĉi, Boji (Kvereli) = *Argue*

Ĉu mi brajligu tion por vi? = *Do I have to spell it out for you?* [“brajl-” estas neoficiala radiko]

Ĉu vi kaptis la aludon? = *Did you catch the drift?*

Komprenite?; Ĉu vi kunsekvas? = *Get it?*

Ĉu vi ankoraŭ ne aŭdas la sonorilon? = *Still doesn't ring a bell?*

Ne ĉiam gurdur la samon = *Stop harping on the same string*

Mi estas ĝisgorgo plena de tio/satas de tio/havas stomakon plenan de tio = *I'm fed up with that*

Tio estis la hoko sur la u = *That was the last drop* [la “hoko sur la u” estas la supersigno kiu faras ŭ el simpla u]

Ne ŝovu nazon en fremdan vazon = *Mind your own business*

Kion diable vi umas? (aŭ: faraĉas) = *What the hell are you doing?*

Kion vi kvakas? = *What are you whining about?* [“kvak-” estas neoficiala radiko]

Kion vi muelas/makzelas? = *Stop going on about it!*

Ĉesu plendi! = *Stop moaning!*

Ĉit!, Fermu la buŝon = *Shut up! Get lost!* [“ĉit-” estas neoficiala vorto]

Fekon sur vian kapon!, Fekon sur vian patrinon! = *Damn you!* [“fek-” estas neoficiala radiko]

Iru al diablo!, Iru inferen! = *Go to hell!*

Kaj foru! = *And stay away!*

Trankviliĝu!, Kalmiĝu! = *Calm down!* [“kalm-” estas neoficiala radiko]

Forigi (ion), Senigi sin (je io) = *Get rid off, dump*

Geuloj – Folks

Ulo = *Guy, Bloke* (Also: Tipo, Ekzemplero...)

Ulĉjo = *Geezer*

Oj, ulĉjo, mi parolas al vi! = Oi, geezer, I'm talking to you! ["oj" estas neoficiala radiko]

Ino = *Girl, broad*

Injo = *Chick*

Ĉjo-nomo = *Guy's nickname*

Njo-nomo = *Girl's nickname*

Junulo, Adoleskulo = *Youngster, teenager* ["adolesk-" estas neoficiala radiko]

Dudekulo = *Someone in their 20's* [pli formale: dudekumulo]

Tridekulo = *Someone in their 30's* [pli formale: tridekumulo]

Mezaĝulo = *Middle-aged person*

Aĝulo, Oldulo, Maljunulo = *Elderly person* ["old-" estas neoficiala vorto]

Soriko = *wimp* ["soriko" formale signifas "shrew"]

Dupo = *Goof* ["dup-" estas neoficiala radiko]

Strangulo = *Weirdo*

Umulo, Nebululo = *Freak*

Nululo = *Failure, loser*

Elfalulo (Malalĝustigulo) = *Drop-out*
(Li ne volas dungigiĝi = *He doesn't want to be employed*)

Sentaĝulo = *Good for nothing, punk*
(Neniu volas dungi lin = *Nobody wants to employ him*)

Fuŝulo = *Mess maker*

Diplomita fuŝulo = *An authorized jerk*

Cimcerbulo; Kartonkraniulo; Ŝtipkapulo;... (Stultulo) = *Jerk*

Kreteno = *Cretin, imbecile* ["kreten-" estas neoficiala radiko]

Inertulo = *Slack guy*

Tedulo, Ŝelulo = *Boring person*

Bravulo = *Good sport, Square and fair*

Streĉulo = *Crammer*

Ŝajnigulo, Falsulo = *Fake (guy)*

Surfaculo (Malprofondulo) = *Superficial person*

Denaska amarulo = *Innate sourpuss*

Ŝlimulo = *Sleazy guy*

Vomiga ulo = *Sickening bloke*

Putinido = *Son of a bitch* ["putin-" estas neoficiala radiko formale signifanta "female prostitute"]

Aĉulo, Mokulo = *Prick*

Maliculo = *Nasty bloke*

Ranculo, Mucidulo = *Awful, coarse, ruthless bloke* ["mucid-" estas neoficiala radiko]

Furzulo = *Guy who sucks* ["furz-" estas neoficiala radiko formale signifanta "fart"]

Folulo, Senklapulo (Frenezulo) = *Nutter* ["fol-" estas neoficiala radiko]

Li ne havas ĉion hejme = *He's got bats in the belfry*

Mankas ŝraŭbo en lia kapo = *He's got a screw loose*

Havi truon en kapo = *To be a fool*
(*"Have a hole in the head"*) □



**POR RIDIGI
VIN**



Akuzanto: "Ĉu vi mortigis la viktimon?"

Akuzato: "Certe ne!"

Akuzanto: "Ĉu vi scias kiel ni punas tiujn kiuj mensogas?"

Akuzato: "Jes, multe malpli severe ol tiujn kiuj mortigas!" [El *Tamen Plu*]

Hajkoj

Je la tria de septembro klubanoj en Sid-
nejo verkis "Hajkojn"¹.

Jen niaj provoj:

Penso libera
estas krimo severa
sub ĉefo fera.

Virino iam
amis min kiel tiam
sed plu neniam.

Reĝas la glavo
fuĝas nepo kaj avo,
venkas malpravo.

Vespera suno
briletas en aŭtuno,
aperas luno.

Frank

Morgaŭa suno
tra la fenestro brilas.
Filo vekigu.

La vintra vento
malvarmigas bovojn
en la kamparo.

Sid

Esperantistoj
Ja ĉiam optimistaj.
Printempo venas.

Folioj buntaj
disas sur ĉiuj vojoj.
Baldaŭ vintra neĝ'.

Anoj pensegas
Poemoj malrapide
el menso fluas.

Edna

Floroj floradas
bonodoroj migradas
Printempo ekas.

Al polvo seka
trafas guto vekiga
naturo daŭras.

Terio

Kun dorm' inklino
svingas brakojn kaj krurojn
kontraŭ deklivo.

Alan

El *Tamen Plu* oktobro 2001.



POR RIDIGI VIN



Ateisto trankvile fiŝkaptis en Lago Ness en Skotlando, kiam subite la fifama monstro atakis la boaton. Per unu facila frapeto, la besto pelis lin kaj la boaton almenaŭ 30 metrojn en la aeron.

Tiam ĝi malfermis la buŝegon kaj atendis malsupre por engluti ilin. Dum la viro falis transkapiĝe al la malfermita faŭko de la feroca besto, li elkriis: "Ho, mia Dio! Helpu min!"

Subite la sceno haltis kaj dum la ateisto pendis meze en la aero, laŭta voĉo aŭdiĝis el la nubaro kaj diris: "Mi pensis ke vi ne kredas je mi!"

"Nu, Dio, pardonu min!" petegis la viro, "antaŭ nur sekundoj mi ankaŭ ne kredis je la Monstro de Lago Ness!"

"En ordo," diris Dio, "Nun, ĉar vi estas kredanto, vi devas kompreni ke mi ne intencas fari miraklojn por savi vin de certa morto en la faŭko de la monstro, sed mi povas ŝanĝi korsentojn. Kion vi volas ke mi faru?"

La ateisto konsideris momente kaj tiam diris: "Ho Dio, bonvolu aranĝi ke la Monstro de Lago Ness ankaŭ kedu je vi."

Kaj Dio respondis: "Tiel estu."

La sceno rekomenciĝis kaj la ateisto denove falis al la malsatiga faŭko de la bestego.

Dum li falis, li vidis la beston kunmeti la ungegojn kaj aŭdis ĝin diri: "Sinjoro, benu ĉi tiun manĝaĵon kiun vi tiel afable provizis..."

[De Dennis Pease. El *Argenta Filiko*.]

¹ Hajko: fiksforma poemeto konsistanta el 17 silaboj (5-7-5) versigita per uzo de iu el la "sezonaj vortoj", kiuj indikas apartan objekton aŭ senton de la sezonoj. (El *Enciklopedio Japana*)

Indekso 2001

49 = januaro-februara numero
 50 = marto-aprila numero
 51 = majo-junia numero

52 = julio-aŭgusta numero
 53 = septembro-oktobra numero
 54 = novembro-decembra numero

AEA/NZEA:

AEA Auditor's report 51/21
 De la sekretario de AEA 51/17, 52/18
 La ĝenerala kunveno de AEA 20 jan 2001 50/17
 Mesaĝo de la prezidanto de AEA 51/18
 Nov-zelanda Esperanto-Kongreso 2002 52/24
 NZEA-a jarkunsido 2001, de Howard Gravatt 51/12
 Raporto pri la 17a Aŭstralia somerkursaro de Esperanto 13-22 jan 2001, de Jennifer Bishop, John Gallagher, Sandor Horvath, Franciska Toubale 50/17
 Somerlernejo 2001 52/11

Artikoloj:

1a Konferenco de Verduloj Tutmondaj – Global Greens 2001, de Jennifer Bishop, Sandor Horvath, Brian Currie 52/15
 35a ILEI-Konferenco 2001 53/23
 Al la esperantistoj renkonte, de Franciska Toubale 49/5
 Apelacio al la konscienco de la hommaro: de Dachau al la homaj rajtoj, duobla datreveno 53/17
 Ĉu ekzistas Esperanta folkloro? de Riitta Hämäläinen 52/8
 Esperanto en 2000, de Aleksander Korĵenkov 50/11
 Helopeto por funkciigi la Projekton "Per A - Por E" 54/11
 Humuro en Esperanto, de Donald Rogers 53/3
 Instrui Esperanton en Vjetnamo, de Franciska Toubale 54/4
 Krioj sur deklivoj (Stefan kaj Hahnal MacGill) 54/17
 La ĉefministro kiu malaperis, de Patriŝa Harkin 49/4
 Librovenoj de UEA 2000 50/6
 Ligo de Instruistoj, de Jennifer Bhshop 54/15
 Mallonga superrigardo de la internacia patent-sistemo, de Roland Rotsaert 53/10
 Miaj fruaj jaroj en Dubbo NSW, de Kep

Enderby 49/9

Oficialaj festotagoj en Esperantio 51/5
 Oz: la lando sen problemoj, de Joyce Bunting 51/15
 Raporto de la ĉefdelegito de UEA en Aŭstralio, de Brian Currie 50/16
 Ronald Biggs kaj mi, de Betty Batt 52/12
 Vizito al la Nacia Esperanto-Biblioteko, de Jennifer Bishop 51/6

Dezirias respondi

50/15, 53/17

Ekzamenoj:

AEA-ekzamenoj, informas Marcel Leereveld 51/11
 Sukcesis en ekzamenoj 50/14

El la regionoj:

49/19, 50/24, 51/20, 52/23, 53/25, 54/12

Interreto:

[Regula rubriko en ĉiu numero. Atentu specife pri la ĉisekvaj:]
 eLibroj en e-librejo, de Franko Luin 50/3
 e-poŝtaj kaj ret-adresoj 49/23, 50/15, 51/11

Konkursoj: 54/6,7

Lingvo:

Ĉu fakultativa akuzativo? de Eugène de Zilla 51/8
 Gramatika angulo: Kio estas komplemento? de Marcel Leereveld 54/13
 Laŭ mia vidpunkto: Ĉu la dua lingvo por ĉiuj? de Kalle Kniivalä 53/16
 Malformalaj esprimoj 54/20
 Pri la esperanta gramatiko (parto 2: la verboj) de Donald Broadribb 49/20
 Zamenhof kaj la lingvaĵo en *Marta*, de Donald Broadribb 52/22

Literaturo

Du diaj monaj ridetoj, de Sylvan Zaft 50/4
 Hajkoj 54/24
 La sekreto de Ŝam, de Aniruddha Banhatti 52/3
 Tri rakontoj 51/13

Mapoj:

La mondo antaŭ 1492: 52/kovrilo
 Nov-Zelando parte trovita 1663 49/kovr-

ilo

Suda Poluso kaj la suda hemisfero 1676:
50/kovrilo 50/1, 50/26

Nototoj:

3ZZZ 53/14

Aventuro en Nepalo 5/26

Ĉu Esperanto ĉiumonde? 51/17

Esperantaj historiaĵoj Aŭstraliaj 52/24

Nevintra kanto 52/24

Novaj Esperanto-poŝtmarkoj 54/3

Odlo Bokserp:

Nova jaro, nova jarcento, nova jarmilo
49/26

Odlo Bokserp: Lia paĝo 53/26

Odlo Bokserp: Liaj paĝoj 54/18

Odlo Bokserp raportas 52/25

PEAA prezidanto tutmonde honorita
pro sia kontribuo al la scienco 50/25

Personoj:

Donald Broadribb — ne plu akademiano
51/13

Omaĝe al Erol Chick, de Paul Desailly
50/22

Dianne Lukes & medaliono Torr 50/18

William Carl Olsen (nekrologo) 54/5

J.M. Schleyer (Beatiĝo) 53/24

Trevor Steele & OSIEK-premio 49/22, 53/
14

Akademiano 51/13

Karina Turvey (naskiĝo) 53/14

Recenzoj:

Adventures in Esperantoland, de Ralph
Harry 53/10

*Australian & New Zealand Esperanto
Dictionary* 49/11 (rec. Marcel Leerev-
eld); komentoj de Donald Rogers 49/
14

Brazila Esperantisto 53/9

Danteskaj itineroj, de Vittorio Russo 51/
19

Esperanto en Ruslando — historia skizo,
de Halina Gorecka & Aleksander
Korjenkov 51/3

Esperanto-gazetoj legeblaj en Interreto,
de Donald Broadribb 53/19

La Hobito, aŭ tien kaj reen de Tolkien
51/3

Jurgen, de James Branch Cabell 53/9

La lada tambureto, de Günter Grass 52/
20

La metamorfozo de Franz Kafka 49/17

La vidvino kaj la profesoro de Ronald
Gates 49/3

Marta, de Eliza Orzeszko 52/20

Ni sekvu Kriston, de Thomas A Kempis
53/9

Ni tostu la verdan fortunon KD de Geor-
go Handzlik 51/19

Resurekto de Tolstoj 51/4

Rusaj amnoveloj de ĈeHov, Bunin,
Nabokov 51/5

Skribas la legantoj:

Paul Desailly 54/9

Margaret Furness 49/18, 50/10

Hazel Green 53/15

Peter Johnstone 51/18

Boris Kolker 51/18

Rudolf Koppel 53/15

Arthur Mortimer 51/18

Dudley Parkinson 50/10

Andreo J. Penk 49/18

Ken Rolls 53/15

Trevor Steele 54/8

Franciska Toubale 50/10

English Supplement Index 2001

January-February:

Translation Competition

Esperanto Internetting for Beginners

March-April:

Esperanto in Forestry

International Association of Professors
Accredits AIS

Results of last issue's translation com-
petition

For Beginners

May-Jun:

From the AEA-Secretary

New Translation Contest

Bill Harmon's Stories

For the Beginner — Those Pesky Verbs:
The Future

July-August:

From the AEA-Secretary

Why is Esperanto Similar to a Bicycle *or*
Why is English Similar to a Car?

Our Contest Results

For the Beginner — those Pesky Verbs:
"Would"

September-October:

Translation Contest

November-December:

For the Beginner — from the *Funda-
mento*

**LA AŬSTRALIA KAJ LA
NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ**

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

Prezidanto: *Jennifer Bishop*, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122.
☎ 03 9818 7358 (AH), 03 9905 2806 (BH); 📠 03 9905 3668 (BH).
esperanto@education.monash.edu.au

Vicprezidantoj:

Franciska Toubale, 1 Marne Rd, Mt Evelyn Vic 3796.
franciska@bigpond.com

Hazel Green, 44 Toowoomba Rd, Oakey Qld 4401.
hazgreen@tmba.design.net.au

Sekretario: *John Gallagher*, 81 Lalla Road, Lillydale Tas 7268.
abcetc@ozemail.com

Vicsekretario: *Bob Felby*, 6 Dorset St, Semaphore Park SA 5019.
☎ (08) 8242 1460.
esperantobob@picknowl.com.au

Kasisto: *Stephen Pitney*, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122.
Pitney@Cybernetint.net

Vickasisto: *Frank Braham*, 5 Marriot Rd, Moorabbin Vic 3189.
fbraham@aol.com

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

Prezidanto: *Bradley McDonald*, PO Box 12 103, Auckland 1135.
☎ 09 579 4767, 📠 09 579 1070.
neelam@voyager.co.nz

Sekretario: *Howard Gravatt* PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035, New Zealand.
☎ 09 626 6129.
hgravatt@ihug.co.nz

Kasisto: *Jackie Fox*, Unit 89 Crestwood Village, 38 Golf Road, Titirangi Auckland 1007. ☎ 09-826 2081. brianandjackie@abztrak.co.nz

KOTIZOJ:

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

<http://www.esperanto.org.au/>
AŬ\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familianoj] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al la Kasisto de AEA: Stephen Pitney, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

<http://www.geocities.com/esperanto-nz>
NZ\$40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: *Jackie Fox*, Unit 89 Crestwood Village, 38 Golf Road, Titirangi Auckland 1007.

Unuopaj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruco*: Por membroj, AŬ\$3 + poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtsendkosto. Menu de la Libroservo de AEA.

Abonoj ekster Aŭstralazio: €23.70, pagu al la konto ael-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 2001 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas ©2001 de la Aŭstralia kaj la Novzelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de *ESK* estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb per iMac DV SE, la programo uzita estas FrameMaker. La tiparo uzita estas New Century Schoolbook. La reteldono estas preparata per Power Mac 7200, kaj Acrobat.

Specialaj kunlaborantoj:

Odlo Bokserp, I.N.K. K.R.A.J.O.N, K.R.E.T
Prezidanto de la Internacia Asocio de Presmistoj
Vera Doloro, L.M.K.
[lia multsuferranta kontrolanto]

Kaj la pelikanaj gepatroj de Porto

For the Beginner

by Donald Broadribb

A few words about the development of Esperanto may not go amiss, in explaining some of the mysteries of Esperanto usage.

Esperanto was first made known to the world in 1887, by Dr. L. L. Zamenhof, then living in Warsaw. His first booklet on Esperanto was in Russian, and is popularly known as the *Unua Libro*. Its 40 pages included, among other things, a very brief grammar of Esperanto, and a dictionary containing some 920 entries. These were updated over the years, and were combined with a further section originally published in Zamenhof's *Dua Libro* (1888), and a preface, to form the book *Fundamento de Esperanto* (1905).

The *Fundamento*, as it is commonly called, consists of

- (1) A major preface in Esperanto, outlining the nature of the book and the proposed method for further development of Esperanto;
- (2) A basic sketch of grammar, in French (6 pages long), English, German, Russian, and Polish (each 5 pages long) but *not* in Esperanto;
- (3) A set of 42 reading exercises, called the "Ekzercaro", entirely in Esperanto, with translations of the individual words used into French, English, German, Russian, and Polish;
- (4) A dictionary with somewhat over 4000 entries, entitled "Universala Vortaro de la Lingvo Internacia Esperanto", giving French, English, German, Russian, and Polish translations for each entry, and occasional sample phrases and a very few examples of usage.

It may be noted that the dictionary items in the "Ekzercaro" and those in the "Universala Vortaro" do not always agree in all details.

By common consent, the *Fundamento de Esperanto* is regarded as the basic rule book for Esperanto grammar and usage. There have been many editions, and it has been kept in print ever since it first appeared. Unfortunately it has no index, so it is not always easy to use. But as a book detailing the fundamental principles of Esperanto and giving basic Esperanto style, it is very worth the having. Some important details from the *Fundamento*

by: is translated by "de" when used after a word ending in *-ata*, *-ita*, or *-ota*.

For example, *ŝi estas amata de ĉiuj* = "she is loved by everyone". Since *de* also commonly means "from", it is important to remember that confusion can sometimes arise. For example, *ĉeko estis ricevita de mia amiko* normally means "a cheque was received by my friend". In order to say "a cheque was received from my friend" usually something extra is required: either *elde* or *disde*. Although usually there is little confusion, sometimes there is, and good style as well as good communication demands clarity: *Ĉeko estis ricevita elde/disde mia amiko* = "A cheque was received from my friend".

Of course, often a simple *mia amiko sendis ĉekon* will do and there will be no confusion possible; but style and context do not always allow for this.

por and **pro** both sometimes do service for English “for”. **Por** looks forward: “for the purpose of, in order to, in order to be for”. *Mi sendas mian foton precipe por ŝi* = “I am sending my photo particularly for her”. *Mi intencis viziti vin por vidi vian ĝardenon* = I intended to visit you in order to see your garden.

Pro looks backward: “because of, for that reason”. *Pro tio mi ne povas pagi ĝuste nun* = “That is why I cannot pay right now”.

Logically “Thanks for sending me your picture” would be *Dankon pro via sendo de via bildo al mi*; but in imitation of various European languages, most Esperantists prefer to say *Dankon por...*, although *pro* is also perfectly acceptable.

Before:

“**Before**” or “**in front of**” usually is *antaŭ*. This indicates a location, either literal or metaphorical —

Antaŭ la sekva vojkruciĝo turnu vin maldekstren. = Before the next intersection turn left.

Antaŭ la domo staras arbo. = In front of the house there stands a tree.

Antaŭ lia alveno, mi pretigos dormoĉambbron por li. = Before his arrival I will prepare a bedroom for him.

Septembro venas antaŭ oktobro. = September comes before October.

La lernejestro parolis antaŭ granda grupo. = The principal spoke before a large group.

Antaŭ pli ol cent jaroj estis Esperantistoj en Aŭstralio. = More than a hundred years ago there were Esperantists in Australia. [This is the most common way of expressing the concept of “ago”.]

Antaŭ tri tagoj mi vizitis vian kuzon kaj mia vizito faris al li plezuron.
= Three days ago I visited your cousin, and my visit gave him pleasure.

La pastro, kiu mortis antaŭ nelonge = The priest, who died not long ago

“**Previously**” is *antaŭe*. What is confusing is that in English we often use “already” or “before” with the same meaning as “previously” —

Kiam vi vidis min en la salono, li jam antaŭe diris al mi la veron.
When you saw me in the hall, he had already told me the truth.

Mi faris tion antaŭe, kaj mi faros tion denove. I did it before and I will do it again.

Antaŭe ŝi kutimis skribi per plumo, sed nun ŝi uzas komputilon. = Previously she used to write with a pen, but now she uses a computer.

Pagu same kiel vi pagis antaŭe. = Pay the same way as you did before.

Many Esperanto students are confused by the use of the phrase *antaŭ ol* instead of simply *antaŭ* in certain instances. *Antaŭ ol* is used when a simple verb is directly involved. (A “simple verb” is a word ending with *-i*, *-as*, *-is*, *-os*, or *-us*.):

Antaŭ ol vi venos al mi, li diros al mi la veron = Before you come to me, he will tell me the truth.

Mi sendis la monon al li antaŭ ol mi foriris. = I sent the money to him before I left.

Antaŭ ol enpoŝtigi la leteron, metu poŝtmarkon sur la koverton. = Before mailing the letter, put a stamp on the envelope.

In fact, this is the easiest way of saying “Before...-ing” in Esperanto.

Mi malfacile dormas antaŭ ol flugi en aviadilo. = It’s hard for me to sleep before flying in a plane.

Ĉu vi ne bezonas atendi ilin antaŭ ol mendi la picon? = Don’t you need to wait for them before ordering the pizza?

“**After**” is usually *post*:

Post la vespermanĝo = After tea [evening meal]

I usually have a nap after lunch = *Kutime mi iom dormas post la lunĉo.*

“**Later**” or “**afterwards**” is usually *poste*:

Nur iam poste = Only sometime later

Mi petas vin ankaŭ poste prunti al mi, kiam mi bezonos monon = I ask you also to give me a loan later, when I will need money

Post unu horo = An hour later

Li paliĝis de timo kaj poste li ruziĝis de honto. = He turned pale with fright, and afterwards he blushed with shame.

There is a somewhat strange inconsistency, from an English language point of view, in Esperanto when it comes to “post” with a simple verb. We are accustomed to seeing “before” and “after” as pretty similar, both refer to time. In Esperanto, they are traditionally treated in very different ways.

“Before eating, wash your hands” is *antaŭ ol manĝi, lavu viajn manojn*; but:

“After eating, wipe your mouth” is *post manĝi, viŝu vian buŝon*. It is not customary to use *ol* after the word *post*, even though the same sense with *antaŭ* does require *ol*: *antaŭ ol manĝi, viŝu vian buŝon*. There is no good explanation for why there is this traditional inconsistency, but for good style you need to keep it in mind.

In the *Fundamento*, *post* is not used at all in such sentences; instead, a complex verb form ending in *-inte* is used:

Trovinte pomon, mi ĝin manĝis. = After finding an apple, I ate it.

La malfeliĉa knabino, multe kurinte kaj trovinte neniun = The unhappy girl, after running a lot and finding no one

Although the complex verb forms look rather complicated to an English speaker, they are the norm for good style when expressing the meaning of “after doing something”. But if they are too difficult for you, many Esperantists prefer a simpler way:

Post kiam li dormis, li duŝis kaj vestis sin = After he slept, he showered and dressed himself

Nur post kiam ili venis, mi trovis ke ili estas geedzoj. = It was only after they came that I found they were married.

Nur post kiam ni sendis al vi la fakturon, ni trovis vian ĉekon. = Only after we sent you the bill did we find your cheque.

We'll do the washing up after you go. = *Ni lavos la pladojn post kiam vi foriris.*

Numbers:

The writing out of numbers is basically simple in Esperanto. The *Fundamento* gives several examples of the preferred method:

1893 is written out as *Mil okcent naŭdek tri*. The principle is that the meaning of each of the numbers in the figure is written as a separate word:

1 = thousand = mil

8 = eight hundred = okcent

9 = ninety = naŭdek

2 = du

Other illustrations from the *Fundamento*:

dek du = 12

dudek du = 22

tridek kaj kvardek kvin faras sepdek kvin

30 + 40 5 = 7 5

The *Fundamento* writes

la kvindek-unua tago de la jaro = the 51st day of the year, but

la jaro mil sepcent tridek dua = the 1732nd year.

In present day usage, most people would use hyphens in both expressions: *la jaro mil-sepcent-tridek-dua*.